




VARGA Domokos György

Šaũmeto




Šaiūmulo



Malpurajūlo



Šaiūmeto



Šaiūmreĝo

LA TRADUKO BAZIĜAS SUR LA SEKVA ELDONAĴO:

VARGA Domokos György: Habocska

Libroj "Reintegratio", jaro 2009 Budapeŝto

Respondeca redaktisto: s-ro MALECZKI József

Priarta revizianto: s-ino DÉNES Krisztina

En la akcesora kompaktdisko:

Komponisto kaj kantisto: GRILLUS Vilmos

Laŭtleĝas BOKOR Barna

VARGA Domokos György

ŠAŪMETO

Desegnis

PERJÉS Bernadett

Tradukis


VIZI László

Lingve reviziis

Morteza Mirbaghian

REINTEGRATIO · BUDAPEST





Unua rakonto, en kiu malkovriĝos,
kial Ŝaŭmeto nomiĝas Ŝaŭmeto

Imagu! Ŝaŭmeto estas bela kvinjara knabineto, sed ŝi ne ĉiam estis kvinjara, ne ĉiam estis bela, kaj ne ĉiam ŝi nomiĝis Ŝaŭmeto. Nur ekde tiam oni ŝin nomas tiel, kiam foje ŝia patrino terure koleriĝis. Ĉu vi scias, kial ŝi koleriĝis? Ĉar Ŝaŭmeto – kiu ankoraŭ nomiĝis ne Ŝaŭmeto – malpuriĝis de la plandoj ĝis la verto. Ŝi fariĝis kotkovrita, ŝlima, malpura, sordida. Se vi interesiĝas pri la detaloj, do sciu, ke ŝia verto malpuriĝis pro tio, ĉar ŝi provis stari surkape en freŝa printempa herbejo; ŝiaj vestoj pro tio, ĉar ŝi ne sukcesis fari tion; kaj ŝiaj plandoj pro tio, ĉar ŝi volis eksenti, ekĝui la agrablan molecon de la freŝaj, bonodoraj herboj, kaj tiun de la varmeta tero. Eĉ ŝiaj vangoj fariĝis malpuraj, ĉar ŝi jam ekde sia konsciiĝo tre ŝatis marmeladan buterpanon, do antaŭ ol stari surkape, kaj antaŭ ol demeti la ŝuojn kaj ŝtrumpetojn, ŝi diris al sia patrino:

– Bonvolu doni marmeladan buterpanon!

Patrino zorgeme ĉirkaŭrigardis por diveni, kiajn petolaĵojn povus fari ŝia filino en la ĝardeno, dum la marmelada buterpano prepariĝos en la kuirejo. Sed plenkreskuloj neniam havas tiom da fantazio, kiom infanoj, do la patrino de Ŝaŭmeto – kvankam ne tute sen maltrankvilo – rapidis en la kuirejon por produkti marmeladan buterpanon. Kiam ŝi revenis, Ŝaŭmeto jam aspektis, kiel aprido, kiu ĵus finis kotbaniĝon, kaj ŝi gaje etendis la manon por preni la ŝatatan manĝaĵon.

Vi povus pensi, ke la patrino de Ŝaŭmeto ĝuste tiam koleriĝis. Sed tio



estas eraro. Kvankam ŝia korbato fakte haltis por momento, kaj ŝi tre ĉagreniĝis, tamen ne kriegis, nur ĝeme flustris:

– Kion vi faris, karulino, kion vi faris?

– Mi staris surkape – ridis Ŝaŭmeto.

Patrino deziris kovri sian vizaĝon per la manoj, sed permane ŝi tenis ĝuste la marmeladan buterpanon, do ŝi etendis ĝin al la buŝo de Ŝaŭmeto, kaj diris:

– Mi ne donos ĝin en viajn manojn. Ili ja estas malpuregaj. Demordu pecojn.

Jen, la vizaĝo de Ŝaŭmeto pro tio fariĝis malpura, glueca, pli precize buterkovrita kaj marmeladkovrita tute ĝis la oreloj.

– Do vi devas baniĝi! – deklaris patrino en ordona tono.

Ŝaŭmeto (kiu ankoraŭ havis alian nomon, kiel mi jam menciis) tuj rediris:

– Mi ne volas!

Ŝi ja ne ŝatis baniĝi. Se vi interesiĝas pli detale, do sciu, tial ŝi ne ŝatis baniĝi, ĉar ŝi timis akvon.

Jen, tiam venis la grava momento, kiam la patrino de Ŝaŭmeto terure koleriĝis. Ŝi jam ignoris, ke ankaŭ ŝiaj propraj vestoj fariĝos malpuraj, ignoris, kion ŝatas aŭ ne ŝatas la filino, ŝi levis ŝin sub la akselon, kaj la knabineto vane baraktis, kriegis, ŝrikis, ploraĉis kaj ribelis, ŝi estis portita en la domon, en la loĝejon, rekte en la banĉambron. Tie patrino ekverŝis varmetan akvon, kaj dum la akvo gaje plenigis la bankuvon, ornamitan per fabelaj figuroj, ŝi tute senvestigis Ŝaŭmeton, kiu ankoraŭ ploraĉis kaj plorsingultis – poste: plaŭ, ŝi mergis ŝin en la rapide kreskantan akvon.

Ŝaŭmeto sentis, ke haltas ŝia spirado.

Komence pro la ektimo.

Poste pro la surprizo.

Ĉar por diri la veron: ŝi ĉesis timi.

"Eble mi maturiĝis iom – pensis Ŝaŭmeto. – Vespere mi rakontos tion al Patro!"

– Ĉu mi enverŝu banŝaŭmon? – demandis patrino. Ŝi tenis en la mano verdan flakonon, kaj estis preta por enverŝi iom.

– Verŝi deziras mi mem! – etendis la manojn Ŝaŭmeto.

– Bonvolu – ekridetis panjo, kaj eligis suspiron al la ĉielo. – Sed estu singarda, ĉar facile povus elverŝiĝi tro multe da ĝi.

Ŝaŭmeto subite renversis la flakonon, kaj ekpemis ĝin tiel forte, kiel ŝi povis.

– Kion vi faras?! – demandis panjo, kaj kaptis ŝiajn manojn.

– Ŝaŭmon.

– Sed tiu porcio estas tro granda!

– Ne tro granda!

– Nepre tro granda, sed tio estas ankoraŭ nerimarkebla. Jen, rigardu!

Ŝi kirlis la akvon per la mano, kaj tuj elkreskis belegaj blankaj ŝaŭmfloroj. Ŝaŭmeto gaje frapadis ilin ambaŭmane, pro tio ili kreskis plu. Tiagrade ili kreskis, ke ili atingis ŝian kolon, poste eĉ la randon de la bankuvo.

Ŝaŭmeto ankoraŭ senĉese frapadis la akvon, kaj kriadis:

– Ŝaŭmeto, ŝaŭmeto, ŝaŭmeto!

– Kie vi estas, filineto mia? – aŭdiĝis la maltrankvila voĉo de panjo.



– Ŝaŭmeto, ŝaŭmeto, ŝaŭmeto! – kriadis Ŝaŭmeto en ekstazo.
– Mi vidas vin nenie! – kriis panjo.
– Mi estas en ŝaŭma Mirlando! – respondis Ŝaŭmeto. – Mi estas la unusola filino de la reĝo, reganta en ŝaŭma Mirlando.
– Bone, bone, tamen malkaŝu vin Ŝaŭmeto! – kriis panjo; kaj en tiu momento la nomo de Ŝaŭmeto decidiĝis: Ŝin, kiel la unusolan filinon de la reĝo, reganta en ŝaŭma Mirlando, oni decas nomi Ŝaŭmeto.
Kiel do ŝi nomiĝis pli frue, tio jam restu eterna sekreto.
Sed tion, kio okazis en ŝaŭma Mirlando, en la admirinda regno de Ŝaŭmreĝo, mi rakontos en la sekvaj ĉapitroj.



Dua rakonto, en kiu oni povas ekvidi

ŜAŬMAN Mirlandon

Imagu! La plej mirinda eblo de ŝaŭma Mirlando estas tio, ke vi mem povas ĝin konstrui kaj plibeligi. Ŝaŭmeto levis la brakon, kvazaŭ ĝi estus fervoja bariero, poste mallevis ĝin. Ĉe alia loko ŝi denove levis la brakon, kaj denove mallevis ĝin. Tiel ŝi eltranĉis kompletan ĉirkaŭfosaĵon, kaj jen, tuj antaŭ ŝiaj okuloj flosis la neĝblanka ŝaŭmkastelo de Ŝaŭmreĝo. Turon ĝi ankoraŭ ne havis, sed tiu manko estis facile riparebla: Ŝaŭmeto formis pintan konuson el ŝaŭmo, kaj metis ĝin al la konvena loko. Ŝi atentis eĉ pri tio, ke ŝi elfosu kavon en la interno de la kastelo, por ke Ŝaŭmreĝo kaj liaj subuloj havu liberan spacon por tie loĝi.

Ĉu liaj subuloj?

Temas efektive pri ili!

Tuj post kiam Ŝaŭmeto finis la konstruadon kaj ornamadon, ŝi ekaŭdis voĉojn, kiuj esprimis teruriĝon.

– Ve, ve! – kriis pluraj samtempe kaj tute en la proksimo. Sur la akvosurfaco naĝis taĉmento de timigitaj malpuraj makuloj haste movante la naĝilojn, kaj rekte al ŝi.

– Kiuj vi estas? – demandis Ŝaŭmeto surprizita.

– Ne asertu, ke vi ne scias tion! – alrigardis ŝin grumble la plej granda el ili, kiu estis verŝajne la generalo.

– Kial tion mi devus scii? – replikis Ŝaŭmeto.

– Ĉu vi demandis, kial? Kion vi pensas: kie ni restadis ĝis nun?

– Kie do?

– Sur via korpo. Sed kiam vi mergiĝis en la akvon, ni ekiris por vidi la mondon. Ja ni estas la malpuraĵuloj.

– Ĉu malpuraĵuloj?

– Jes, malpuraĵuloj – kapjesis la verŝajna generalo.

– Kial via taĉmento veadis?

– Ĉu vi ne vidis ilin?

– Kiujn?

– La ŝaŭmulojn. Ili volis engluti nin.

– Tio ne povas esti! – kapneis Ŝaŭmeto. – En ĉi tiu regiono ne vivas kanibaloj. Tio estas: antropofagoj. Pli ĝuste: malpuraĵvoruloj.

– Tamen ili vivas en ĉi tiu regiono! Ni eĉ aŭdis, kiam Ŝaŭmreĝo komandis, ke ili urĝe englutu ĉiun malpuraĵon, makulon, sordidaĵon. Kaj tiam la ŝaŭmuloj tuj komencis amase persekuti nin. Estas feliĉe, ke ni estis pli rapidaj... Sed vidu, tie ili proksimiĝas! Ili baldaŭ atingos nin! Ve, ili englutos nin!

– Venu tuj sur mian kolon! Kaptu miajn harojn! Kaŝiĝu en miaj oreloj! – kriis Ŝaŭmeto.



La ŝaŭmuloj – jen – venis en granda regimento, en batala formacio. Ili naĝis efektive malpli rapide, tamen firme kaj persiste, kaj kiujn malpuraĵulojn ili atingis, tiuj pereis. La malrapidaj ŝaŭmuloj englutis ilin, kvazaŭ ili neniam pli frue ekzistus. La ŝaŭmuloj postlasis bele puran akvosurfacon. Sed oni ankoraŭ longe aŭdis la ĝemadon de kompatindaj malpuraĵuloj.

– Tuj ĉesu! – postulis Ŝaŭmeto.

La plej granda ŝaŭmulo – eble la generalo – alrigardis ŝin kun flegma mieno.

– Ni ne rajtas ĉesi. Komandon ja oni devas plenumi.

– Sed ĉi tie komandas mi mem! Temas pri mia teritoria akvo!

– Tio estas grava eraro! – respondis firme la verŝajna generalo. – Temas pri la regno de Ŝaŭmreĝo.

– Estas vi, kiu eraras! – replikis Ŝaŭmeto, kaj ŝi grumble frapis la akvon. Tio ne estis agrabla situacio por la ŝaŭmuloj, ĉar kelkaj ondoj abrupte surverŝis ilin, kaj pro tio kelkaj eĉ iomete ŝrumpis. Sed la situacio de malpuraĵuloj estis tute ne pli bona, ĉar tiujn, kiuj ne estis sufiĉe singardaj, la ondoj forlavis de sur la haroj kaj oreloj de Ŝaŭmeto, kaj ili devis multe klopodi, por reveni al la rifuĝejoj.

– Pardonon – ekskuzis sin Ŝaŭmeto, poste aldonis: – Estos plej oportune, se mi intertraktados kun Ŝaŭmreĝo.

La kastelo de Ŝaŭmreĝo flosis ĉe ŝiaj piedoj, en la mezo de la bankuvo. Ŝaŭmeto permane pelis ĝin pli proksimen, kaj kriis al ĝia interno:


– Hola! Ŝaŭmreĝo!

Ŝaŭmreĝo aperis en parada blanka ŝaŭmmantelo, sur lia kapo sidis neĝblanka ŝaŭmkrono.

– Bonvolu, filineto mia!

– Ho, efektive! – frapis sian frunton Ŝaŭmeto. – Ja mi estas via unusola filino.

– Kompreneble! Kaj mi tute ne proponas al vi ribeli kontraŭ la volo de via reĝa patro – avertis ŝin Ŝaŭmreĝo, kaj admone levis sian etenditan montrofingron. Ekde kiam ekzistas ŝapo, banŝaŭmo kaj



ŝampuo, la tasko de ŝaŭmuloj estas engluti tiujn sentaŭgajn malpuraĵulojn. Eĉ unusola ne plu restu el ili!

– Mi tamen defendos ilin!


– Vi ja ne aŭdacu defendi ilin, ĉar mi fermos vin en la karcero de kastelturo, kaj vi ne estos libera, ĝis vi ne montros pli prudentan pensmanieron. Sed eble vi ĵus estis alvokata, ĉu ne?

Ŝaŭmeto orelumis.

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto! Ĉu vi ne aŭdas? For el la bankuvo!

– Kondutu bone vi ĉiuj! – flustris Ŝaŭmeto. – Morgaŭ ni renkontiĝos denove!

Kaj ŝi – kvankam ekstere ŝi sentis malvarmon kaj iom tremis – forlasis ŝaŭman Mirlandon.





Tria rakonto, en kiu la domaraneo

fine eskapos

Imagu! La plej mirinda afero en ŝaŭma Mirlando estas tio, ke vi ĉiutage povas rekonstrui, reornami ĝin. Ja ne sufiĉas frapadi la akvon, dikigi la ŝaŭmon, levadi la brakojn kaj tranĉi ĉirkaŭfosajon, sed oni devas fari ankoraŭ ion. Ĉu vi sukcesis diveni, kion? Efektive! Kiumaniere ekzistus malpuraĵuloj en ŝaŭma Mirlando, se dumtage vi ne rampadus sub la lito, kaj vi ne ludadus en la polvo? Kiumaniere ekzistus malpuraĵuloj se vi ne malpurigus viajn vangojn per marmelado, kaj ne ŝmirus viajn manojn per grasaĵo? Kiumaniere ekzistus malpuraĵuloj se vi ne sidiĝus sur la malseka sablo, se vi ne glitadus malsupren sur la ŝtuparbarilo, se vi ne enpaŝadus ĉiun flakon?

Do Ŝaŭmeto devis multe penadi por havi la amikan rondon de malpuraĵuloj, jen, pro tio ŝi persistis firme kontraŭ Ŝaŭmreĝo:

– Prefere fermu min en la kastelturo, tamen mi ne lasos persekuti la malpuraĵulojn!

– Ĉu tiuj viaj vortoj estas definitivaj?

– Jes – kapjesis Ŝaŭmeto.

– Do, iru en ĝin! – ordonis la reĝo, kaj montris al la kastelturo.

Ŝaŭmeto mutiĝis pro ektimo. Ŝi surpriziĝis, ke reĝo povas tiel severe trakti sian unusolan filinon. Por diri la veron, ŝi ege maltrankviliĝis pro la imago, ke ŝi jam en sia tuta vivo devos restadi fermita en malvasta kastelturo. Tiu maltrankvilo estis tamen bagatelo kompare al la sekva teruriĝo, kiu atakis ŝin.

Dika araneo malleviĝis de sur la plafono de la banĉambro! Ŝaŭmeto laŭte ŝrikis, kvankam ne tiel laŭte, ke ŝia patrino aŭ patro povus ekaŭdi ŝian voĉon en la kuirejo aŭ en la tagĉambro, sed la ŝaŭmuloj

kaj malpuraĵuloj tuj ekaŭdis ĝin. Ŝaŭmgeneralo haste ordigis sian armeon, kaj petis permeson por raporti. Ŝaŭmreĝo kapjesis.

– Mi raportas, ke aŭdiĝis laŭta ŝriko. Niaj skoltoj priobservis, ke la koncernan voĉon elbuŝigis Ŝaŭmeto pro araneo rapide proksimiĝanta.

– Kaptu la kulpulon! – komandis tuj Ŝaŭmreĝo.

– Ĉu Ŝaŭmeton?

– Ŝtipokapulo! – ekkoleris Ŝaŭmreĝo. – La araneon!

– Je via ordono! – rektigis sin la generalo, kaj urĝe forvaporiĝis.

Ankaŭ la generalo de malpuraĵuloj, alinome Nigra Generalo ordigis sian armeon, sed li faris tion por tuj marŝi al Ŝaŭmeto senmanke.

– Kio okazis, Ŝaŭmeto? Ĉu aperis problemo? Ĉu ni povus helpi al vi?

Ŝaŭmeto montris al supra direkto, sed apenaŭ ŝi povis eldiri: – Araneo! – ŝi ĝemis.

La generalo de malpuraĵuloj rigardis al la montrita direkto.

– Jen, efektive! Araneo. Ĝi estas ne danĝera. Tute ne.

– Sed mi timas ĝin!

– Kompreneble! Tial vi timas ĝin, ĉar vi ankoraŭ ne konas ĝin. Se vi interkonatiĝus kun ĝi, vi ne timus.

– Sed mi ne povas interkonatiĝi, ĉar mi ja timas ĝin! – kaj Ŝaŭmeto grimacis por ekplori.

– Vi ankoraŭ timas, tamen, se vi interkonatiĝos, vi ne timos. Ni prezentos vin unu al la alia, se nur ĝi proksimiĝos ankoraŭ iomete. Sciu, ke ni, malpuraĵuloj estas en bona amikeco kun araneoj. Sed kio estas la intenco de Ŝaŭmuloj?! – kriis Nigra Generalo.



La ŝaŭmuloj efektive penadis diligente. Ili naĝis sub la aranean fadenon, ordiĝis laŭ ronda formacio. Dum la araneo proksimiĝis al la akvosurfaco, ili malvastigis la rondon, kaj interkroĉiĝis pli kaj pli firme.

Vidinte tion Nigra Generalo laŭte komandis:

– Malpuraĵuloj! Pretigu vin por kuratako! Celo estas la rondo de ŝaŭmuloj! Ataaaku!

Ili ĉiuj ekkuris por ataki. La ŝaŭmuloj sendube konfuziĝis, do ili disiĝis por turni sin kontraŭ la malamikoj. Ili eĉ englutis kelkajn el tiuj, sed ankaŭ ili mem suferis perdojn. Kelkaj el la ŝaŭmuloj tute griziĝis, kio estas malrapida sed certa perejo por ili.

La dispelita armeo de malpuraĵuloj haste forfuĝis, sed la ŝaŭmuloj persekutis ilin. Vane Ŝaŭmgeneralo, eĉ la reĝo kriegis, ke "Haltu, haltu! Returnu vin! Revenu!", ili ekhavis tian batalemon, ke ili aŭdis kvazaŭ nenion.

La araneo libere kaj tute sen skrupuloj proksimiĝis al la akvosurfaco.

– Do mi mem mortigos ĝin! – diris Ŝaŭmreĝo, kaj li haste naĝis sub la araneon.

– Ne insultu lin, patro mia! – kriis Ŝaŭmeto.

– Mi ja devas defendi vin! – kontraŭdiris Ŝaŭmreĝo.

– Ĝi estas nur araneo, ĝi estas sendanĝera!

– Tamen! Ordo estas la fundamento de la mondo! Araneo ne rajtas esti en la banakvo de mia filino! – deklaris Ŝaŭmreĝo sen toleri replikon.

– Se vi amas min almenaŭ iomete, permesu, ke la situacion solvu mi mem! – ĝemis Ŝaŭmeto.

Ŝaŭmreĝo heziteme pensadis. Li facile eltenis la tondrojn de militoj, sed la ĝemadon eĉ ploradon de sia unusola filino li eltenis ege malfacile. Do li turnis sin, kaj grumble, kun reĝa ofendiĝemo forlasis la batalsituacion.

Ŝaŭmeto siaflanke elektis ŝaŭminsulon, grandan kiel manplato, kaj komencis blovpeli ĝin. La insulo, brilanta per ĉiuj koloroj de ĉielarko, floris ĝuste sub la araneon, kiu proksimiĝis kvazaŭ el la ĉielo.

Kiam la araneo surteriĝis – mi volis diri: surŝaŭmiĝis – ege ekmiris, kian regionon ĝi trafis. Ĝi ne povis grimpi plu malsupren, ĉar la brila molaĵo haltigis ĝian malpezan korpon; sed ankaŭ regrimpi ĝi ne povis, ĉar la glueca ŝaŭmo retenis ĝin. La araneo jam preskaŭ ektimis, kiam la insulo leviĝis, kaj komencis ŝvebi, moviĝi en la aero.


Ĉu vi povas diveni, kiu levis la insulon permane?

Tion faris Ŝaŭmeto, kompreneble!

– Ĝis revido! – ŝi diris afable, poste proksimigis la manon al iu kahelo de la muro, kaj lasis, ke la araneo, tiel rapide kiel ĝi povas, forfuĝu al sia ĉiela – pli precize plafona – regno.

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto! Ĉu vi ne aŭdas? For el la bankuvo!

– Tuj mi venos – kriis ŝaŭmeto, kaj ŝi forlasis ŝaŭman Mirlandon.



Kvara rakonto, en kiu
ŜAŬMETO
fine konsoliĝas

Imagu! Ŝaŭmeto malgaje klinis sian kapon, do la reĝo de ŝaŭma Mirlando tute rezignis pri sia intenco enkarceigi ŝin en la kastelturo.

– Kial vi estas tiel malgaja? – li flustris en orelon de Ŝaŭmeto, sed ŝi nur senvorte levis la ŝultrojn. Ŝaŭmreĝo estis sufiĉe maljuna kaj saĝa por diveni, ke nur unusola motivo povas kaŭzi tiun malbonan humoron.

– Vi ja vizitis la infanĝardenon hodiaŭ, ĉu ne?

Ŝaŭmeto heziteme kapjesis.

– Do konfesu, ke vi interkverelis kun tiu... Nu, kiel li nomiĝas?

– Mi ne interkverelis kun li – kapneis Ŝaŭmeto.

– Bone, bone, sed kun kiu vi ne interkverelis?

– Kun Steĉjo Tajlor.

– Evidente! – kapjesis Ŝaŭmreĝo, kaj aldonis: – Do Steĉjo Tajlor amas iun alian.

– Iun alian – ripetis mallaŭte Ŝaŭmeto, kaj ŝiaj larmoj ekfaladis kiel pluvego.

– Pro kio vi pensas, ke li ne amas vin?

– Ĉar li ektiris la harojn de alia knabino, stumbligis alian knabinon, desegnis florojn kaj plektis braceleton al alia knabino – plorsingultis Ŝaŭmeto.



– Diable! – grumblis Ŝaŭmreĝo. – La problemo estas grava!
Generalo! - li kriis.

Ŝaŭmgeneralo senprokraste aperis kaj rektiĝis:

– Ŝaŭmgeneralo anoncas sin je via ordono!

Sed ankaŭ Nigra Generalo aperis neatendite, li naĝis en la ŝaŭmkastelon tra la pordego, kaj demandis:

– Ĉu iu vokis min?

Ŝaŭmgeneralo tuj eltiris sian glavon.

Ankaŭ Nigra Generalo tuj eltiris sian glavon.

– Militpaŭzo! – kriis Ŝaŭmreĝo. – La problemo estas ege grava!
Ŝaŭmeto estas malgaja.

– Malagrabla – notis Ŝaŭmgeneralo.

– Eĉ terure! – vigliĝis Nigra Generalo.

– Kiu ŝin pli frue konsolos, tiu ricevos de mi ŝian manon kaj la duonon de mia regno! – deklaris Ŝaŭmreĝo, kaj samtempe li konsideris sin tre maljuna kaj senpotenca. Kiom pli facile estas administri grandan ŝaŭman Mirlandon, ol mildigi la kordoloron de juna knabineto.

Ŝaŭmgeneralo kunvokis sian armeon per trumpetsignalo.

Ankaŭ Nigra Generalo faris la samon.

La du armeoj staris suspekteme unu kontraŭ la alia. Sed nur ĝis tiam, kiam la generaloj deklaris la taskon: Oni sekigu la larmojn de Ŝaŭmeto, regajigu ŝian mienon!

– Kiu ĵ havas taŭgan ideon, tiuj viciĝu antaŭ mi! – ordonis Ŝaŭmgeneralo.

Tri ŝaŭmuloj vigle naĝis tien.

– Ariĝu ĉirkaŭ mi, bravuloj miaj! – manvokis ankaŭ Nigra Generalo al sia taĉmento. – Ni pritraktu kune tiun ĉi eksterordinaran batal-situacion.

Ili interkonsiliĝis mallaŭte, por ke la najbara armeo aŭdu eĉ ne unu vorton.

– Ĉu vi estas pretaj? – kriis Ŝaŭmreĝo.

– Ni estas pretaj! – diris pluraj el diversaj direktoj.

– Laŭ la etiketo mi devas doni eblon unue al miaj propraj subuloj – deklaris Ŝaŭmreĝo. – Vi povas komenci! Ŝaŭmeto, kara mia, atentu! – li diris al la filineto.



Ŝaŭmeto iomete plorsingultis, eĉ tremis iomete pro la malvarmiĝinta banakvo, tamen firmigis sin kiel eble.

La unua ŝaŭmulo naĝis antaŭ ŝin, kaj emfazis ĉiun unuopan vorton dirante:

- Postkuri ĉaron, kiu vin ne akceptas, estas vana klopodo.
- Mi postkuras tion, kion mi volas! – replikis Ŝaŭmeto spiteme.
- Alvenis la sekva bravulo:
- Ajna ĉagreno pasos kun la tempo!
- Esence sence! – mansvingis Ŝaŭmeto, kaj ŝi denove eklarmis.

Sed tuj aperis tria kandidato:

– Amo ligas kaj blindigas! – li diris kaj levis sian etenditan montrofigron.

– Mankas klapo en via kapo! – plorsingultis Ŝaŭmeto, kaj kovris la vizaĝon per la manoj.

"Baldaŭ eĉ mi mem ekploros", maltrankviliĝis Ŝaŭmreĝo. – Malpuraĵuloj rapidu, rapidu, sekvos via kompanio.

Nigra Generalo dignoplene naĝis al Ŝaŭmeto. Li returnis sin, kaj manvokis siajn soldatojn. Tiuj viciĝis laŭ duoncirklo, kaj montris solenan mienon. Nigra Generalo levis la brakon, mallaŭte ekgrakis, poste ekgakis, fine ekkvakis, kaj hop! mansignis. Samtempe la koruso de malpuraĵuloj ekkantis:

*Lago sekas, bord' humidas, ran' mortinta kriaĉas,
Homo surda ĝin aŭskultas, en la akvo li naĝas.
Plumo vesperta, jen vi estas nesperta!
Plumo vesperta, jen vi estas nesperta!*

Ŝaŭmeto kompreneble ne povis reteni ridadon, poste eĉ komencis kanti: "*Plumo vesperta, jen vi estas nesperta!*" – kune kun la koruso de malpuraĵuloj. Ŝi eĉ direktadis la muzikon ambaŭmane.

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto! Kiel bonan humoron vi havas! Sed ĉesu jam baniĝi!

– Tuj mi venos! – ŝi respondis, kaj forlasis ŝaŭman Mirlandon.



Kvina rakonto, en kiu oni povas informiĝi pri la televidmalsano de

ŜAŬMETO

Imagu! Ŝaŭmreĝo rekonis, ke la manon de sia filino kaj la duonon de sia lando li vane promesis al tiu, kiu konsolos Ŝaŭmeton, ĉar li ne povas plenumi sian reĝan promeson. Per ŝaŭma sceptro li skribis zigzagajn kalkulojn sur la ŝaŭma planko de la ŝaŭmkastelo, li dividis kaj multiplikis, fine evidentiĝis, ke unu malpuraĵulo ricevus el Ŝaŭmeto malpli, ol ŝia ungo sur la eta fingro. Sed tiel malgrandan membron – se okazus regula geedziga festo – oni eĉ teni ne povus. Do la maljuna, saĝa reĝo ordonis venigi Ŝaŭmgeneralon, kaj mesaĝis al Nigra Generalo, ke li bonvolu fari viziton en la parada ŝaŭmkastelo, se tio ne estus troa penado por li.

Tuj alvenis ili ambaŭ.

– Mi publike deklaras – komencis solene Ŝaŭmreĝo –, ke mi alte taksas la brilan sukceson de malpuraĵuloj. Mi devas konfesi, ke ili fakte sekigis la larmojn sur la vizaĝo de mia malgaja filino, kaj ili rebonigis ŝian humoron. Sed Ŝaŭmeto ne havas tiom da manoj, kiomope estas la malpuraĵuloj, do ili ne povas ricevi ŝian manon. Mi decidis doni al ĉiu unuopa malpuraĵulo la plej altan distingon de ŝaŭma Mirlando: la Ŝaŭmkukon Ornamitan per Etaj Koloraj Sukerkristaloj.

Sur la vizaĝo de Nigra Generalo aperis kontenta rideto.

Sed Ŝaŭmgeneralo faris grimacon, kvazaŭ li mordus citronon.

– Mi konjektis! – alparolis lin Ŝaŭmreĝo. – Mi estis certa, ke vi montrós acidan mienon, do mi decidis, ke ankaŭ ĉiu unuopa ŝaŭmulo ricevos la plej altan distingon de ŝaŭma Mirlando, la Ŝaŭmkukon Ornamitan per Etaj Koloraj Sukerkristaloj. Ĉar mia kuiristino, onjo Eva denove trobakis tutan bakpleton da ŝaŭmkukoj, kaj por diri la veron, tiuj kukoj plorinde ŝrumpis, do ne troviĝas homo, kiu manĝus ilin. Tamen, kiel distingo, ili estas tute taŭgaj. Nu, kion vi pensas? – ĉirkaŭrigardis la maljuna, saĝa reĝo.

Jam ankaŭ sur la vizaĝo de Ŝaŭmgeneraló aperis kontenta rideto.

– Bonege! – diris ĝojplene Ŝaŭmreĝo. – Vicigu la armeojn ambaŭflanke, mi vokos Ŝaŭmeton.

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto!

– Mi ja bone aŭdas.

– Ĉu vi ofendiĝis?

– Mi ja ofendiĝis. Neniu min edzinigos, eĉ mi ne ricevis distingon.

– Bonvolu ne profani tiun ĉi solenan minuton – sulkigis la frunton Ŝaŭmreĝo. – Mi permesas al vi teni la distingojn, ĝis mi pendigos ilin sur la kolo de merituloj.

Tiam el la zigzaga vico de malpuraĵuloj paŝis antaŭen la plej malgranda bravulo, kaj diris:

– Reĝa moŝto, miaj vivo kaj morto estu en viaj manoj!

– Laŭdinde, sed kion vi volas diri?

– Nur tion, ke ankaŭ Ŝaŭmeto meritas distingon.

– Ĉu Ŝaŭmeto? Kial do? Ĉu ŝi faris ion, pri kio mi ne scias?

La plej malgranda malpuraĵulo iomete pripensis la aferon.

– Por diri la veron: jes.

Je tio rondiĝis la okuloj de ĉiu malpuraĵulo kaj ĉiu ŝaŭmulo, eĉ la okuloj de la reĝo.

– Rakontu do!

– Ŝi estas punita.

– Ŝŝŝ! – silentigis lin la ceteraj malpuraĵuloj. – Ne babilaĉu!

– Rakontu! Rakontu! – kriis la ŝaŭmuloj. – Kio okazis? Kiel tio okazis?



– Rakontu! – ordonis Ŝaŭmreĝo en severa tono.
Do la plej malgranda malpurajulo komencis rakonti timeme.

– Ŝaŭmeto spektis televidilon tiel longe, ke ŝin atakis televidmalsano.

– Ĉu temas pri televidilo? Kio ĝi estas? – demandis korusse la ŝaŭmuloj.

– Ĝi estas granda, kolora kesto. En ĝi okazas fabeloj kaj historioj. Oni povas sidiĝi kaj spekti ĝin sen ajna penado – eksplikis la plej malgranda malpurajulo.

– Jes! Ĝuste tiel ĝi funkcias! Admirinde! – kriadis la malpurajuloj entuziasme.

– Suspektinde! – murmuris la ŝaŭmuloj.

– Tuttage oni povas amuziĝi per ĝi. De mateno ĝis vespero – daŭrigis la plej malgranda malpurajulo. – Ekzemple patrino donas al la infano pupon. Aŭ konstrubrikajn. Eventuale bildlibron. La infano ludas, konstruadas aŭ legadas, sed nur kelkajn minutojn, ĉar baldaŭ saltleviĝas kaj kuras al la televidilo por spekti la sekvan fabelfilmon, naturfilmon aŭ ajnan programeron.

– Brrr! – skuiĝis la ŝaŭmuloj – Eĉ la imagi tion estas turmento! – ili esprimis abomenon korusse.

– Pro Dio! – prenis sian kapon la malpurajuloj. – Kion vi pensas, malsagxaj ŝaŭmuloj: Sen televidilo kiamaniere povus informiĝi Ŝaŭmeto, kaj kiamaniere povus informiĝi ni, la malpurajuloj, ke la pezo de baleno egalas kun la pezo de dudek kvin elefantoj?

– Silenton! – kriis Ŝaŭmreĝo. – Mi ne komprenas! En tiu afero kio estas malsano?

– La malsano konsistas en tio, ke post longa sidado antaŭ televidilo Ŝaŭmeto komencas montri strangan sintenon. Ŝi ne povas stariĝi, rampadas sur la planko. Ekzemple ankaŭ mi mem kroĉiĝis al ŝia kubuto dum tia okazo. Ŝi ne aŭdas, kiam patrino alvokas ŝin. Aŭ ŝi permane ŝtopas la orelojn, por ne aŭdi alvokon. Se eble ŝi tamen leviĝas de sur la tapiŝo, nur senfare iradas, ne povas kion fari. Pro tio ŝia patrino kriis: "Jen denove turmentas vin televidmalsano." Kaj ŝia patro kriis: "Via kapo jam kvadratiĝis pro la televidilo, mi forĵetos ĝin tra la fenestro."

– Ĉu ŝian kapon? – teruriĝis Ŝaŭmreĝo.

– Tute ne, reĝa moŝto! La televidilon.

– Ehe – diris Ŝaŭmreĝo frapante sian frunton per la manplato, kvazaŭ ekbrilus lumo en la kapo. – Do tiam Ŝaŭmeto verŝajne komencis plorsigulti, kaj vi pensis, ke ŝi ricevu distingon por konsoliĝi, ĉu ne?

– Reĝa moŝto, miaj vivo kaj morto estu en viaj manoj!

– Tion vi jam menciis. Nun respondu rekte: ĉu vi pensis tiel, aŭ ne?


– Fakte mi pensis tiel.

– Perfidulo! – kriis la aliaj malpuraĵuloj. – Ŝaŭmuloj, manĝu lin!

– Ne insultu lin! – protestis Ŝaŭmeto.

Ĉiuj okuloj gluiĝis al la knabino. La plej malgrandan malpuraĵulon ŝi metis sur la manplaton.

– La afero okazis precize tiel, kiel vi rakontis. Mi jam pripentis mian sintenon, sed mi ne povis venki mian inklinon. Poste mi ne sukcesis retrovi mian prudenton. Vane mi volis, vane mi provis. Kara mia reĝa patro, mi ne meritas distingon!



– Tamen vi meritas ĝin, mia kara filineto! – diris la maljuna kaj saĝa Ŝaŭmreĝo. – Kompreneble ne pro la televidmalsano! Same ne pro la gepatra admono! Eĉ ne pro la plorado! Sed pro tio, ĉar vi mem konfesis, ke vi ne meritas ĝin.

Tiam Ŝaŭmreĝo prenis la malplej trobakitan kaj malplej ŝrumpan ŝaŭmkukon, ĝuste tiun, kiu estis plej bele ornamita per koloraj sukerkristaloj, kaj per longa haro li pendigis ĝin sur la kolo de Ŝaŭmeto.

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto! Vi grave malvarmumos, forlasu la bankuvon!
– ŝi aŭdis la voĉon de patrino.

– Tuj mi venos – kriis Ŝaŭmeto, kaj forlasis ŝaŭman Mirlandon.





Imagu! La ŝaŭmuloj ekhavis tiel bonan humoron pro la plej alta distingo de ŝaŭma Mirlando, kiu estas Ŝaŭmkuko Ornamita per Etaj Koloraj Sukerkristaloj, ke ili ekkantis plengorĝe:

Ŝaŭma kuk' sukeraĝ' de plezur'...

Ili intencis kanti plu plengorĝe, kun nebridebla bonhumoro, sed la malpuraĵuloj komencis malglori korse.

– Fi! Fi! Ni abomenas Ŝaŭman kukon! Ni abomenas kremŝaŭmon, ovŝaŭmon, banŝaŭmon, sapŝaŭmon kaj ĉion, kio povas engluti nin!

Sed la ŝaŭmuloj ne cedis. Ili atendis, ĝis la malpuraĵuloj devis enspiri aeron, kaj tiumomente ili denove ekkantis:

*Ŝaŭma kuk' sukeraĝ' de plezur',
Tuta klaft' estu ĝia mezur'...*

La malpuraĵuloj ja ne atendis pli da provoko! Ili koleriĝis tiagrade, ke unu el ili tuj verkis parodian varianton. Li grimpis sur la ŝultrojn de iom grandkorpa kolego, tie li kantis, kaj direktis siajn senbridajn kompanojn.

*Ŝaŭma kuk' sukeraĝ' de rubuj',
Malpurega por malpuraĵul'...*

Pro tio jam eĉ Ŝaŭmreĝo koleriĝis.

– Halt! – li kriis. Sed estis nenia rezulto, kvazaŭ li krius al surduloj. Do li rapidis al sia unusola filino.

– Admonu viajn malpuraĵulojn, Ŝaŭmeto, mi petas!

Tamen, oni jam ne devis admoni la malpuraĵulojn, ĉar ili subite mutiĝis tiel, kvazaŭ ili estus englutitaj. Kvankam la ŝaŭmuloj ankoraŭ ne englutis ilin, sed ili aranĝis sin laŭ batala formacio, ili formis el si larĝan maldensan vicon, kaj je la komando de Ŝaŭmgeneralo ili samtempe ekmarŝis. Jen, la malpuraĵuloj vane povis rapide kaj bele naĝi, eĉ tio ne gravis, ke la ŝaŭmuloj estis malrapidaj, kiel heliko, kaj malviglaj, kiel bradipo, la malpuraĵuloj tamen ne havis ŝancon. La bankuvo havis konkretajn limojn.

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto! – kriis la malpuraĵuloj. – Protektu nin! Permesu, ke ni grimpu sur viajn hartufojn! Lasu, ke ni kaŝiĝu sub viaj oreloj, ke ni rifuĝu sur via verto!

– Mi bedaŭrinde ne povas cedi al vi – kapneis Ŝaŭmeto. – Estis vi mem, kiuj provokis.

– Sed nia vivo estas en danĝero!

– Eĉ pro tio mi ne povas cedi.

– Ĉu eĉ pro tio ne? – surpriziĝis la malpuraĵuloj.

– Eĉ pro tio ne.

– Ĉu eĉ pro tio ne? – ili jam teruriĝis.

– Eĉ pro tio ne.

– Kaj kiel vi decidis, se ni promesos malglori kaj mokadi neniam plu?

Ŝaŭmeto hezitis.

– Tion mi ankoraŭ pripensos – ŝi respondis.

Dume la regimento de ŝaŭmuloj marŝis plu en batalformacio, kaj ili ĉiuj unuece intencis ataki la impertinentajn malpuraĵulojn.

– Helpon! Helpon! – kriis la malpuraĵuloj. Pro la senespera teruriĝo kelkaj el ili klopodis grimpi al la rando de la bankuvo. Sed la ŝaŭmuloj ariĝis tie, ili ondigis la akvon, kaj kompatindaj malpuraĵuloj reglitis.

Sed antaŭ ol ili estus englutitaj, okazis io neatendita.



Zzz. Zzz. Zzz.

Ĉies atento estis kaptita. La plej malgranda malpuraĵulo ekkriis terurigiinta:

– Oni atakas nin per helikoptero!

– Stultulo! – riproĉis lin Ŝaŭmgeneralulo. – Tio estas rrr, kaj ne zzz!

Zzz. Zzz. Zzz.

"Efektive zzz!" – diris en si mem la plej malgranda malpuraĵulo honteme. – "Sed kio ĝi povas esti?"

Zzz. Zzz. Zzz.

– Jen, kulo! – ŝrikis Ŝaŭmeto, kaj ŝi montris al supra direkto.

Nigra Generalulo ekkriis:


– Ŝaŭmeto, ŝirmu vin!

Ankaŭ Ŝaŭmgeneralulo ekkriis:

– Ŝaŭmeto, ŝirmu vin!

Sed Ŝaŭmeto ne sciis, kiel ŝi povus ŝirmi sin.

En tiu momento Ŝaŭmgeneralulo levis supren sian distingon, la Ŝaŭmkukon Ornamitan per Etaj Koloraj Sukerkristaloj, kaj ekiris al Nigra Generalulo. Ankaŭ Nigra Generalulo levis supren sian distingon,



la Ŝaŭmkukon Ornamitan per Etaj Koloraj Sukerkristaloj, kaj ankaŭ li ekiris al Ŝaŭmgeneralo, kvankam liaj genuoj tremis iomete.

– Ni nepre devas protekti Ŝaŭmeton! – ili deklaris preskaŭ samtempe, kiam ili estis jam sufiĉe proksime unu al la alia.

Zzz. Zzz. Zzz.

– Helpon! Ĝi pikos min! – ŝrikis Ŝaŭmeto.

– Subaviĝu! – kriis Nigra Generalo kaj Ŝaŭmgeneralo kvazaŭ korse.

– Sed tiel mi dronus!

– Elŝovu nur vian nazon!

– Tiel ĝi estos pikita!

– Pro tio vi ne maltrankviliĝu! Ni tuj venos, tuj kuregos, tuj aktiviĝos!

Nigra Generalo prenis la manon de Ŝaŭmgeneralo, kaj tiris lin antaŭen. – Ŝaŭmuloj! Malpuraĵuloj! – ili komandis siajn subulojn dekstrajn kaj maldekstrajn – la celo estas la nazpinto de Ŝaŭmeto! Ni ŝirmos la knabinton eĉ per nia propra korpo, se necese!

La malpuraĵuloj kaj ŝaŭmuloj senmanke ariĝis sur la vizaĝo de Ŝaŭmeto. Iuj ŝirmis ŝian fronton, aliaj ŝiajn orellobojn, palpebrojn aŭ nazon, elstarantajn el la akvo. La kulo aŭdacis pliproksimiĝi, eĉ zumadis pli kaj pli laŭte. Ĝi rondflugis, dancis en la aero, ne pli ol kelkajn centimetrojn for de ŝia vizaĝo, ĉar ĝi tamen esperis trovi neŝirmitan punkton, sed la taĉmentoj de malpuraĵuloj kaj ŝaŭmuloj lerte kompaktiĝis antaŭ ĝi.


Zzz. Zzz. Zzz.

La kulo – kion fari – flugis for sensukcese. Ŝaŭmeto finfine povis residiĝi, kaj ekspiri profunde.

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto! Ĉu vi surdiĝis? – aŭdeblis la voĉo de patrino.
– Forlasu la bankuvon!

– Tuj mi venos – kriis Ŝaŭmeto, kaj forlasis ŝaŭman Mirlandon.

Sepa rakonto, en kiu gasterosteo preskaŭ dronas



Imagu! Ŝaŭmeto frapadis la banakvon tiel longe, ĝis la ŝaŭmkastelo de Ŝaŭmreĝo fariĝis tiom granda, ke ĝi povus rigardi super la rando de la bankuvo, se entute ĝi havus vidkapablon. Eĉ la ŝaŭmuloj kreskis tiagrade, ke sur la trono de Ŝaŭmreĝo ili povus tuŝi la plafonon de la ŝaŭmkastelo, se ili rajtus sidi sur la trono. Sed ili ja ne rajtis.

Ĉu ili rajtis, ĉu ne, ili ĉiuj eksentis tiagradan fierecon, ke ili ne povis reteni kantemon. La ŝaŭmuloj rektiĝis, fermis la okulojn, kaj ekkantis per sonora voĉo. Ne bagatelan pecon ili prezentis, sed la Himnon de Ŝaŭmuloj:

*Jen, pro ŝaŭmuloj la akvo puriĝas,
brilas la haŭto, ondas la haroj.
Roto bravega de l' ŝaŭmuloj
pretas por batal'.*

*Jen, pro ŝaŭmuloj makulo nuliĝas,
nepre timegas eĉ malpuraĵo.
Roto bravega de l' ŝaŭmuloj
pretas por batal'.*

*Sen la Ŝaŭmuloj Ekzisto ne estus,
mankus eĉ Ordo, mankus Beleco!
Roto bravega de l' ŝaŭmuloj
pretas por batal'.*

Ŝaŭmeto nur aŭskultis, aŭskultadis la sonorajn kanton, kiu plenigis la spacon, kaj ŝi rimarkis, ke ŝia brusto ŝvelas pro la fiereco. Kvazaŭ eĉ ŝi mem estus ŝaŭmulo. La knabineto karesis sin ĉe la brakoj kaj ŝultroj, kaj ekĝojis pro la brilo de sia haŭto. Ŝaŭmreĝo kontente observis sian unusolan filinon, sed Nigra Generalo fariĝis des pli maltrankvila.


– Kio konfuzis vian kapon? – li demandis Ŝaŭmeton.

– Ne ĉikanu min! La kantado estas vere bela!

– Bela, sed malprava.

– Laŭ mia opinio ĝi estas prava. Mia haŭto fariĝis pli bela, ĉu ne? Miaj manoj estas pli puraj, ĉu ne? – entuziasmis Ŝaŭmeto, kaj ŝi komencis zumkanti:

*Sen la Ŝaŭmuloj Ekzisto ne estas,
mankus eĉ Ordo, mankus Beleco!
Roto bravega de l' ŝaŭmuloj
pretas por batal'.*



– Mi havas ideon, Ŝaŭmeto! – ekparolis Nigra Generalo post paŭzeto. – Kriu al via patrino, ke ŝi venu al vi.

– Ŝi ne rajtas veni ĉi tien! Ĉi tie estas ŝaŭma Mirlando!

– Ne permesu, ke ŝi venu en la akvon, nur apud la bankuvon. Diru al ŝi, ke ŝi alportu gasterosteon el la akvario. En vitra ujo de konfitajo.

– Bone, sed kion fari, se ŝi diros, ke mi rompos la vitran ujon?

– Insistu, ke vi ne rompos ĝin.

– Kion fari, se ŝi tamen ne fidus min?

– Argumentu, ke vi baldaŭ vizitados lernejon.

– Panjo! Panjo! – kriadis Ŝaŭmeto plengorĝe.

– Ho, vi timigis min, Ŝaŭmeto, mi pensis, ke okazis grava problemo!

– Bonvolu alporti gasterosteon en bokalo, plena de akvo.

– Sed vi eventuale rompus la bokalon!

– Mi estos singarda, mi ne rompos ĝin.

– Sed kio okazos, se ĝi hazarde elglitos el viaj manoj? Se ĉie estos vitropecoj? Ĉu vi baniĝos inter vitropecoj?

– Tio ne okazos! Mi ja baldaŭ vizitados lernejon!

– Ho, Ŝaŭmeto, filino mia! – suspiris patrino, sed ŝi baldaŭ alportis bokalon, en kiu naĝadis vigla gasterosteo.


Ŝaŭmeto lasis la bokalon mergiĝi, kaj ĝi komencis flosi inter la ŝaŭmaj ondetoj.

– Kio estas tio? – miris la plej malgranda ŝaŭmulo, kaj li premis la nazpinton al la vitro de la bokalo.

– Jen, fiŝeto! – kriis la plej malgranda malpuraĵulo ĉe la alia flanko de la bokalo.

La gasterosteo ekscitite naĝadis tien kaj reen, rigardis, observadis la vastan akvon. Eble ĝi estas tiu lago, Balatono, kiun la maljunuloj tiel multe laŭdis. Kiu scias?

– Elvenu! Elvenu! – Instigis la gasterosteon la plej malgranda ŝaŭmulo. Li deziris ludi kun la stranga fiŝeto. La gasterosteo ne povis ignori tiel afablan inviton, do ĝi – hop – elsaltis el la bokalo.



La ŝaŭmuloj ekbruetis pro la ĝojo, kiel maro en facila vento.

– Venu por ludi kun ni! – ili kriadis kaj aplaŭdis.

La gasterosteo kun ĝojo glitis al ili. Sed tuj post kiam la ŝaŭmuloj ĉirkaŭis ĝin, tuj post kiam ĝi sage moviĝis dekstren kaj maldekstren, subite ĝi perdis sian forton, malfermadis la buŝon, kiel sufokiĝanto. Pene ĝi renaĝis al la bokalo, sed eniri ne povis, nur la nazon premis al la ujo, eble tiel reveni, sed la vitro baris la vojon. Ĝi rezignaciis kaj ekfloris senpove. La ŝaŭmuloj kaj malpurajuloj observis ĝin kortuŝitaj. Ŝaŭmeto stuporis pro la ĉagrena vidaĵo. Ĝuste tiam alvenis Ŝaŭmreĝo el sia ŝaŭmkastelo.

– Ŝaŭmeto! – li ordonis – Tuj prenu ĝin permane, kaj remetnu ĝin en la bokalon!

– Sed akvon ne prenu kune kun ĝi! – avertis ŝin Nigra generalo.

– Kial ne? Fiŝoj ja ŝatas akvon! – miris la plej malgranda malpurajulo.

– Puran akvon ili efektive ŝatas! – diris Nigra Generalo, dum li levis sian rektiĝitan montrofinaron kaj ĉirkaŭrigardis kun mieno serioza. – Sed ne ŝaŭman! Pro la ŝaŭma bankvo fiŝoj povas baldaŭ morti! Do mi konsilas al vi, Ŝaŭmeto, admonu viajn amatajn ŝaŭmulojn, ke ili ne parolu al ni fierege, kiel bravuloj sur ĉevalo!

– Kie estas ĉevalo? – miris la plej malgranda ŝaŭmulo.

Ŝaŭmeto intencis tuj respondi al li, sed ŝi ekaŭdis la voĉon de patrino:

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto! Ĉu vi surdiĝis? Forlasu la bankuvon!

– Tuj mi venos – kriis Ŝaŭmeto, kaj forlasis ŝaŭman Mirlandon.



Oka rakonto, en kiu oni trovas nekutimajn makulojn sur la haŭto de Ŝaŭmeto

Imagu! Ŝaŭmreĝo kunfrapis la manplatojn pro la surprizo, kaj diris:

– Ŝaŭmeto, unusola filineto mia! Kiel vi aspektas? Sur vi troviĝas la tuta menuo, kiun vi manĝis: post viaj oreloj estas marmelado, sur via kolo fluetas framposuko. Sub via nazo brilas oleo, ĉe viaj buŝanguloj videblas ĉokolado. Viajn genuojn kovras sablo, viajn manplatojn ornamas inkomakuloj. Al via kapo gluiĝis koto, eĉ iom da sukerpulvoro! Kiel ĝi povis algluiĝi?

– Mi pilkludis.

– Ĉu per sukerpulvoro?

– Kion vi pensas? Per fritbulo. Ĝi estis ronda, kiel pilko.

– Terure! – ekĝemis Ŝaŭmreĝo. – Ĉu via patrino ne trabatis vin pro tio?

– Ne. Ŝi diris nur tion, ke neniam plu ŝi fritos al mi fritbulon, se mi ne aprezos ĝin.

– Ŝi pravas! Manĝaĵon oni ja devas aprezati. Ankaŭ tiun, kiu donis ĝin, same tiun, kiu ne povis ricevi ĝin. Reĝino devas konduti dece.

– Sed mi ja aprezis ĝin! Ĝuste tiel, ke mi pilkludis per ĝi!

– Fi! Oleo kaj gluaĵo! – grimacis Ŝaŭmreĝo. – Ŝaŭmgeneralo! – li kriis senpacience.

Ŝaŭmgeneralo haste naĝis tien.

– Je via ordono, reĝa moŝto!

– Mi volas plenan purigadon!

– Ĉu la ŝaŭmkastelon?

– Ŝaŭmeton! De la plandoj ĝis la verto! Ŝi estas malpura, kotkovrita, sordida!

– Hm, efektive, – konstatis Ŝaŭmgeneralo. – Ŝi estas malpura, polvokovrita, glueca.

– Prave! – konsentis la reĝo. – Komencu!

Ŝaŭmgeneralo formis sonfunelon el siaj manoj, kaj kriis:

– Komencu!

– Ĉu vi eĉ ne petas mian konsenton? – ĝemis Ŝaŭmeto.

Ŝaŭmgeneralo komencis tusadi pro la embaraso.

– Ankaŭ por vi estos pli komforte! – li respondis post paŭzeto.

– Mi fartas malbone.

– Pardonu, sed pro tio mi tute ne estas surprizita. Ankaŭ mi ne fartus bone, se mi estus tiel malpura. Ŝaŭmuloj, eklaboru!

Jen, oni ja ne devis instigi ilin! La ŝaŭmuloj ekĝojis pro la bonega okazo, ke ili povas purigi Ŝaŭmeton de la plandoj ĝis la verto, por ke ŝi fariĝu brile pura. La diligentuloj bonhumore frandis la marmeladon, ĝoje manĝis la ĉokoladon, ne preterlasis la oleon, eĉ ne la sablon. Sed oni devas konfesi, ke pro la inkomakuloj ili devis multe penadi.

– Fuĝu, kiu povas! – kriadis la timigitaj malpurajuloj.

– Bonvolu pli milde! – ĝemis Ŝaŭmeto. – Mi sentas malvarmon.

– Ni tuj finos! – ŝin trankviligis Ŝaŭmgeneralo.

– Per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro. – ŝin konsolis Ŝaŭmreĝo.

– Revenu! Revenu! – kriis Nigra Generalo al sia diskurinta regimento, sed neniu el ili haltis. Tiam li profunde suspiris, kaj decidis komenci la lastan interbatalon. Jes, li batalos ĝis la lasta spiro per unusola glavo, eĉ permane, se necese. La ĉefa grupo de ŝaŭmuloj jam svarmis ĉirkaŭ li, sur la ventro de Ŝaŭmeto, ĉe la umbiliko, kiu cetere estas tre bona embusko por malpurajuloj. Tamen, li ne kaŝiĝos! Li rigardos vidalvide la sorton. La malamikoj proksimiĝis... sed ŝajnas, ke ili observas ion alian anstataŭ li! Ili okupiĝas tute ne pri li. La kompanio ĉirkaŭis ruĝetan makulon. Alia grupo alian ruĝetan makulon, la tria grupo trian makulon.



Ili lavadis, purigadis, sed la makuloj ne malaperis. Ili eĉ frotadis, premadis, la makuloj tamen restis neforigeblaj.

– Sinjoro generalo! Sinjoro generalo! – kriadis la fervoraj ŝaŭmuloj.
– Neniam ni vidis ankoraŭ tiaspecajn malpuraĵulojn, ili estas tre obstinaj!

Ŝaŭmgeneralo naĝis tien dignoplene. Li longe observadis la ruĝetan makulon, poste notis:

– Eble ĝi estas marmelado.

– Certe ne! – kapneis la ŝaŭmuloj.

– Ĉu frambsiropo?

– Neeble.

– Ĉu tomato?

– Ĝi jam estus forigita.

– Kio do?

– Se ni scius tion, la purigado jam estus preta.

– Ehe! – kapjesis Ŝaŭmgeneralo. – Do mi informos Ŝaŭmreĝon, por ke li sendu delegacion al duko Bansapo, ĉar povas helpi sole li. Escepte, se ni aplikus frotpulvoron!

– Ho, ne! – ĝemis Ŝaŭmeto.

– Stultulo! – abruptis Nigra Generalo kontraŭ Ŝaŭmgeneralo.

Ŝaŭmgeneralo sentis, kvazaŭ krevus lia kapo. Li eltiris sian glavon.

– Ek, je glavo! – li kriis, kaj svingis la glavon kontraŭ Nigra Generalo.

– Mi fartas malbone! – ĝemis Ŝaŭmeto. – Tremas mia korpo.

– Kio estas la problemo, filineto mia? – timzorgis Ŝaŭmreĝo.

– Reĝa moŝto, la problemo estas, ke ŝi estas malsana! – kriis Nigra Generalo, dum li lerte evitis glavbaton. – Ŝi estas malsana je varicelo!

– Ĉu je varicelo? – miris la ŝaŭmuloj.

– Varicelo! – ektimis la maljuna kaj saĝa Ŝaŭmreĝo. – Li ekzamenis la ruĝetajn makulojn zorgeme. – Efektive temas pri varicelo!

Ŝaŭmeto frostotremis kaj ĝemetis.

– Panjo! Mi deziras eliri!

– Tion ŝi ne aŭdas – notis Nigra Generalo.

– Mi nombrumos ĝis tri, poste ni krii kune! – ordonis Ŝaŭmreĝo. –

Unu, du tri!

Ŝaŭmreĝo, la ŝaŭmuloj kaj malpuraĵuloj kune kriis:

– Paaanjo! Mi deziras eliiiri!

– Ĉu vi estas eble malsana? – diris patrino alveninte.

– Mi ja estas malsana. Je varicelo! – ĝemis Ŝaŭmeto.

– Kiel vi povus scii tion? – ridetis patrino. – Ŝi ĉirkaŭvolvis Ŝaŭmeton per granda bantuko, kaj ĉirkaŭbrakis ŝin, sed eĉ tra la bantuko sentis, kiel tremas, varmas ŝia malgranda korpo.

– Ŝaŭmreĝo diris tion – ĝemis Ŝaŭmeto.

– Ŝi havas febron, kaj deliras! – flustris

Panjo al Patro.

"Mi ja ne deliras!" – volis diri Ŝaŭmeto, sed nenia voĉo venis el ŝia gorgo. Ŝaŭmreĝo tamen aŭdis tiujn vortojn.

– Mi pensas, Ŝaŭmeto – li diris –, ke dum kelkaj tagoj ni ne renkontiĝos. Tamen ne ektimu: kvankam aperos sur vi tiom da makuletoj, kiom rosogutoj frumatene en la herbejo, ili same forvaporiĝos baldaŭ.



Nauxa RAKONTO, en kiu

la plej malgrandaj ĉeestantoj interamikiĝas

Imagu! Ŝaŭmeto vane frapadis la banakvon, la parada palaco de Ŝaŭmreĝo estis ne pli granda, ol pugno, Ŝaŭmreĝo eĉ malpli granda ol duonpugno. Ankaŭ la ŝaŭmuloj ne povis esti fieraj pri sia staturo, ĉar ili ne estis pli grandaj, ol ungo. La situacion kaŭzis la patrino de Ŝaŭmeto, ĉar ŝi diris, ke portempe oni devas milde trakti la haŭton de Ŝaŭmeto, do uzi nur malgrandan kvanton da banŝaŭmo, por ke ĝi ne damaĝu la makulojn, ne malhelpu la resaniĝon.

Ŝaŭmgeneralo deziris protesti. Li volis deklari, ke ili jam precize rekonas ian ajn spurojn de varicelo, la malhelajn makulojn de la cikatroj, la sangoruĝajn restaĵojn, kaj ili tute ne intencas malhelpi la resaniĝon de reĝidino Ŝaŭmeto. "Ni estas nek ĉiovoruloj, nek kani-baloj! – li diris firme, kaj levis sian glavon kun ŝvelanta brusto. – Ni persistos por manĝi ekskluzive malpuraĵulojn!"

– Brave! Vivu! Prave! – kriis la ŝaŭmuloj, kaj ili disiris por serĉi manĝaĵon.

Sed vane ili traserĉadis la tutan bankuvon kaj ĉiun membron de Ŝaŭmeto, ili trovis eĉ ne unusolan malpuraĵulon.

– Tiu ĉi matĉo estas nevalida! – grumblis la plej malgranda ŝaŭmulo.

Kvankam li tute ne estis malsata.

Ŝaŭmgeneralo kun timzorgo konstatis, ke liaj subuloj revenadas sen plenumi sian taskon. Poste ili denove provadas, denove revenas. Ili vagadas tien kaj reen. Ili nenifaras, enuas. Pro la enuo ili interkverelas, interbatalas, repaciĝas, poste ĉion rekomencas. Ŝaŭmgeneralo frapadis



ĉe la parada pordo de la ŝaŭmkastelo.

– Bonvolu! – kriis Ŝaŭmreĝo.

– Reĝa Moŝto! – diris Ŝaŭmgeneralo. – Troviĝas eĉ ne unu malpurajulo! Ili sukcese kaŝiĝis ie!

– Ili ne kaŝiĝis – kapneis Ŝaŭmreĝo.

– Do kie ili estas?

– Nenie. Ili eĉ ne ekzistas.

– Mi komprenas... aŭ... mi tamen ne komprenas – ekmeditis Ŝaŭmgeneralo.

– Ŝaŭmeto ĉiutage ricevas purajn vestojn – klarigis la maljuna, saĝa Ŝaŭmreĝo. – Eĉ ne nur unufoje, sed trifoje ĉiutage. Kaj ŝi ricevas puran littukon, puran kusenkovrilon, puran peplomkovrilon. Por ke la cikatroj ne infektiĝu! Ĝuste tial estas malpermesite, ke ŝi eliru al la korto. Ŝi litkuŝas la tutan tagon, aŭ kiam ŝi ne kuŝas, do sidadas. Oni legas al ŝi, kantas al ŝi, oni ludas kun ŝi kartludon aŭ grupludon. Oni ne miru, ke eĉ makulo da malpurajlo ne troviĝas sur ŝi.

– Hola! – kriis Ŝaŭmeto ĉe la enirejo de ŝaŭmkastelo. – Mi eltrovis grupludon!

– Nekredeble! – miregis Ŝaŭmreĝo.

– Efektive! Blankaj figuroj apartenas al la ŝaŭmuloj, nigraj al la malpurajuloj. Kiun nombron ili lotumas per ĵetkubo, tiom da paŝoj ili rajtas fari. Kiu paŝas en puton, tiu devas reveni.

– Bonege! – kunfrapis la manplatojn Ŝaŭmgeneralo. – Ĉu la ludilo estas kun vi?

– Tute ne! – ridis Ŝaŭmeto. – Ĝi ja kadukiĝus pro la malsekiĝo!

– Mi tre bedaŭras! – murmuris Ŝaŭmgeneralo. – Miaj soldatoj estas en malagraba situacio.

Kvankam senintence, sed li diris ne la puran veron. Li ne povis scii, ke en la sama momento, kiam li frapadis ĉe la pordo de la kastelo, la plej malgranda ŝaŭmulo ekaŭdis, voĉon: "ŝŝ, ŝŝ!", kiam li estis serĉanta ian manĝaĵon, aŭ ion interesan almenaŭ. Li streĉis la orelojn, kaj denove li ekaŭdis:

- Ŝŝ!
- Kie vi estas?
- En la kavo – flustris nekonato.

La plej malgranda ŝaŭmulo ekiris al la umbiliko de Ŝaŭmeto. Li estis iom maltrankvila, ĉar li pensis, ke eble elsaltos io terura.



Li proksimiĝis malrapide, singarde, preta por tuj returni sin kaj forkuri. Kiel oni diras: urĝe forvaporigi...

- Ŝŝ!
- Nigraj okuloj brilis en la kavo.

La plej malgranda ŝaŭmulo eksentis subitan trankviliĝon, ĉar li tuj rekonis la plej malgrandan malpuraĵulon. Por diri la veron, li eĉ eksentis apetiton je sia rivalo, kvankam malsato ne turmentis lin, sed tia estas la ordo de la mondo kaj la trudforto de alkutimiĝo...

- Ĉu vi timas? – li demandis la plej malgrandan malpuraĵulon.
- La grado de mia timo estas malpli alta, ol la grado de mia enuo.
- Ĉu vi intencas manĝi min?
- Ne nepre. Ankaŭ mi vagadas sencele ekde mateno.
- Ĉu vi havas inklinon por ludi ion?
- Ĉu en la kavo? Ĝi estas tro malgranda.
- Ne en ĝi, sed ekstere.
- Se vi elvenos, mia kompanio manĝos vin.
- Do protektu min, se vi deziras ludi kun mi!
- Mi tre deziras.

La plej malgranda malpuraĵulo, hop, aperis ekstere, sed en la sama momento li ekvidis tutan grupon da proksimiĝantaj ŝaŭmuloj. Ili malfermadis la buŝon, kvazaŭ ili preparus sin por agrabla festeno. Eĉ kantis la kompanio:

*Se vi orde ne iras, kukojn vi ne meritigas!
Do observu regulojn, frandu bonajn menuojn!*

– Halt! – kriis la plej granda malpuraĵulo! – Li elvenis sole por ludi kun mi! Sed la aliaj nur proksimiĝis senhalte.

– Halt! – kriis Ŝaŭmeto, kaj por averti la ĉeestantojn ŝi frapis la akvon per la mano. – Ili deziras ludi. – Ŝi zorgeme levis la plej malgrandan malpuraĵulon, kaj metis lin sur la puran akvosurfacon. – Atentu! Ni komencos grupludon! La celo estas la enirejo de ŝaŭmkastelo. Kiu pli frue frapados la pordon de Ŝaŭmreĝo, tiu venkos. Kiu paŝos en puton, tiu devas reveni al la komenco.

– Sed kio estu puto? – demandis kelkaj.

– Ĉu puto? – pensadis ŝaŭmeto. Ŝi subite tuŝis sian hararon. – Jen mia harringo!

Ŝi nombrumis, kaj ĉe la nombro tri la du plej malgrandaj bravuloj ekkuris. Por diri la veron, la malpuraĵulo estis pli rapida, sed antaŭ la parada enirejo li afektis, kvazaŭ lian kruron atakus spasma, kaj kiam la ŝaŭmulo atingis lin, li prizorgis, ke ili ambaŭ samtempe frapadu la paradan pordon de la ŝaŭmkastelo de Ŝaŭmreĝo.

Ŝaŭmreĝo scivole elŝovis la kapon ĉe la pordo.

Li alrigardis la du bravulojn, poste la ŝaŭmulojn, fine la ridetantajn okulojn de Ŝaŭmeto, kaj diris:


– Jen, tio jam plaĉas al mi.

Kaj li malrapide, laŭ maniero de maljunuloj, fermis la pordon.

– Ŝaŭmeto! Ŝaŭmeto! Ĉu ne estas aktuale por elveni?

– Tuj mi venos – kriis Ŝaŭmeto, kaj forlasis ŝaŭman Mirlandon.





Deka rakonto, en kiu alvenas novaj rolantoj

Imagu, kion kunportis ŝaŭmeto al la bankuvo! Vi eĉ ne povus diveni tion! Ĉu eble tamen? Nu, vi konjektas bone! Suĉtubeton. Tamen ne por suĉi per ĝi, sed por blovi. Komence ŝi provis ĉe la ŝaŭmuloj, sed ili komencis veadĵi, ĉar kiam ŝi blovis en ilian ventron, ili subite kreskis iom, poste tuj ŝrumpis. Poŝte ŝi okupiĝis pri la malpurajuloj, sed ankaŭ tiuj ne havis bonŝancon, ĉar ili perdis siajn brakojn kaj gambojn pro tio. Venis la vico de la ŝaŭmkastelo. Mi eĉ ne bezonas diri, ke pro la blovado ĝia muro difektiĝis tiel, ke Ŝaŭmreĝo tra la truo svingadis sian pugnon pro la kolero, ĝis li ekkomprenis, ke la kulpulo estas ĝuste lia unusola filino, Ŝaŭmeto. Jen, li elkuris al ŝi, kaj abrupte riproĉis la knabineton:

– Damne! Ĉu vi tute perdis la prudenton, filineto mia?!

Je tio Ŝaŭmeto respondis ion, pri kio Ŝaŭmreĝo ne povus pensi, eĉ se li travivus plurcent jarojn.

– Ankaŭ vi devus jam ne streĉi miajn nervojn!

Ŝaŭmreĝo alrigardis ŝin konsternita.

– Kion vi diris, filineto mia?

Ŝaŭmeto defie rerigardis, kaj spite ripetis:

– Ankaŭ vi devus jam ne streĉi miajn nervojn!

– Ĉu mi? Ĉu mi streĉas viajn nervojn? – balbutis Ŝaŭmreĝo.

Ĉe tiuj vortoj Ŝaŭmeto eĉ ŝtopis la orelojn per manplatoj, kaj diris:

– Ne klukadu!

Jen, estas grava bonŝanco, ke Ŝaŭmreĝo estis sufiĉe maljuna kaj saĝa, ĉar sen tio li eble povus krevi pro la kolero, kaj li ne plu povus roli en la rakonto. Do li momenton silentis, poste laŭte demandis:

– Bonvolu diri, mia unusola filineto, kiu kutimas ripetadi, ke "ne streĉu miajn nervojn!"?

Ŝaŭmeto malkovris siajn orelojn, kaj ekpensadis.

– Panjo!

– Aha.

– Kaj paĉjo.

– Aha.

– Kaj avino, kaj la infanĝardenistino, kaj...

– Kaj?

Ŝaŭmeto kunpremis la lipojn.

– Kaj? – urĝis Ŝaŭmreĝo. – Ĉu vi eldiros aŭ ne?

– Kaj Ŝteĉjo Tajlor.

– Diable! – laŭtis Ŝaŭmreĝo. – Kaj kial li kutimas diri tion? Ĉu vi ektiris liajn harojn? Ĉu vi stumbligis lin? Ĉu vi pikis lin per krajono?

– Mi ja fakte pikadis lin, sed ne pro tio li reagis tiel. Ĉar li kutimas diri tion eĉ kiam mi ne pikadas lin. Li eĉ ŝtopas la orelojn. Jen tiel!

Kaj Ŝaŭmeto montris la movon: ŝi forte premis la orelojn per la manplatoj.

Ŝaŭmreĝo ekridetis.




– Kio estas tiel ridinda por vi? – ofendiĝis Ŝaŭmeto. – Ankaŭ vi devus jam ne streĉi miajn nervojn!

– Jen simio imitadas, sur la arboj ĝi saltadas!

Ŝaŭmeto ĉirkaŭrigardis.

– Mi vidas nenian simion!

– La simio estas vi mem, Ŝaŭmeto!





Ŝaŭmreĝo plengorĝe ridis.

Ŝaŭmeto levis la suĉtubeton por bati per ĝi lian kapon, sed ŝia kolero subite forvaporigis, kaj ankaŭ ŝi komencis ridi.

– Vidu – ridetis Ŝaŭmreĝo, vi jam ne estas simio imitema.

– Kio do mi estas?

– Hop! vi fariĝis denove Ŝaŭmeto. Via kolero neniigis, kiel krevinta bobelo.

Ŝiaj okuloj ekbrilis.

– Ni faru sapobobelojn!

– Do ni faru!

– Pluvon da bobeloj!

– Bone.

– Sed kiel oni devas fari bobelojn?

– Tion mi ne povas montri, sed mi povas rakonti. La finon de la suĉtubeto metu en la plej densan parton de la bansaŭmo, iomete eksuĉu ĝin, poste relevu kaj milde blovu ĝin tiel longe, kiel vi nur povas.

Imagu! Ŝaŭmeto tuj, ĉe la unua fojo sukcesis! Novnaskitaj bobeluloj venadis el la suĉtubeto unu post la alia, ili rondiĝis, ŝvelis, poste – hop! – ili saltis en la aeron brilante per ĉiuj koloroj de la ĉielarko, kaj ŝvebadis malsupren. Aperis pli kaj pli multe da ili. La ŝaŭmuloj observis la ĉielon, kaj kaj entuziasme jubilis pro la novaj alvenintoj, sed ili veadis, kiam kelkaj bobeloj krevis. Ankaŭ la malpuraĵuloj observis la ĉielon, sed ili ĝuste inverse reagis: veadis pro la alvenintoj, sed pli trankvile suspiris, kiam iu bobelo krevis en la aero. Sed ili ne multe havis kaŭzon por trankviliĝi, ĉar la brilantaj globetoj pli kaj pli proksimiĝis, kaj kompatindaj malpuraĵuloj ne trovis kaŝejon por eskapi.

– Ŝaŭmeto, ne faru tion! – petis Nigra Generalo, kaj li volis ĝuste distranĉi bobelon, sed ĝi subite krevis per si mem. – La afero streĉas miajn nervojn! Terure!





– Ha-ha-ha! Jen simio imitadas! – mokis lin Ŝaŭmeto.
– Tute malprave, filineto mia! – interrompis Ŝaŭmreĝo. – La malpuraĵuloj efektive timzorgas. Ili timzorgas, ke la bobeluloj eble englutos ilin. Do ili diras tion ne por imiti aliajn.

– Tamen, patro mia, reĝa moŝto, la bobeloj fakte ne povas engluti la malpuraĵulojn. Ilia ŝelo estas tiel maldika, ke ili tuj krevas, kiam ili tuŝas malpuraĵulon. – diris Ŝaŭmeto. – Ili ne estas grandapetitaj ŝaŭmuloj, sed... sed mildaj feinoj de ĉielarko.

Ŝia esprimo estis tiel bela, ke la buŝo de Ŝaŭmreĝo restis malfermita.

Eĉ la plej malgranda ŝaŭmulo gapis surprizita. Li estis ravita, dum tia feino de ĉielarko proksimiĝis, kaj li eĉ moviĝis, por ke ĝi falu sur lin. La globeto trafis lin ĉe la kapo, kaj hop! ĝi englutis la plej malgrandan malpuraĵulon. Super la akvo ekestis prema silento. Tiam la bobelo krevis, kaj la plej malgranda malpuraĵulo staris ĉe la sama loko sendifekta, kortuŝita, feliĉa. Kaj la malpuraĵuloj kaj la ŝaŭmuloj aplaŭdis al li. Faris la samon eĉ Ŝaŭmeto kaj la maljuna, saĝa reĝo.

Poste li alrigardis siajn subulojn kaj sian filineton kun grava mieno.

– Ĉu ankoraŭ troviĝas ĉi tie iu kun streĉitaj nervoj?

– Neniu! Neniu! – diris pluraj en la publiko.


– Ĉu ankoraŭ troviĝas ĉi tie simioj imitemaj?

– Ne troviĝas! – ridis Ŝaŭmeto. Kaj ŝi ridis ankoraŭ eĉ tiam, kiam ŝi ekaŭdis la voĉon de patrino:

– Filineto mia, urĝe elvenu por neniel malvarmumi!

– Tuj mi venos – kriis Ŝaŭmeto, kaj forlasis ŝaŭman Mirlandon.





Dekunua rakonto, en kiu envenas misvojiĝinta pasero, kaj eksplodas milito

Imagu! La somerfina sunbrilo oris la teron kaj ĉielon tiel bele, ke la gepatroj de Ŝaŭmeto forgesis fermi la fenestron de la banĉambro. Baldaŭ bagatela pasero flugis al la fenestrobreto, sed ĝin timigis eble kato aŭ io alia, kaj en la sekva momento ĝi trovis sin en la loĝejo de Ŝaŭmeto. Ĝi flugadis tien kaj reen konsternita, trafis la spegulon, poste la tukrelon. Pro la teruriĝo subite ĝi flugis supren, sed tie li renkontis la subplafonan sekigilon. Li perdis sian forton, refalis senpove, dum atentemaj okuloj sekvis ĝiajn movojn, kaj tio estis bonŝanco por ĝi, ĉar Ŝaŭmeto submetis siajn manojn, antaŭ ol ĝi povus fali en la akvon.

Suspiroj de trankviliĝo ekŝvebis en la aero.

– Vivu! – aplaŭdis Ŝaŭmreĝo, kaj li laŭde kapjesadis.

– Vivu, vivu! – jubilis ankaŭ la ŝaŭmuloj kaj malpurajuloj. – Lerta vi estas, Ŝaŭmeto! Ni estas fieraj pri vi!

La vizaĝo de Ŝaŭmeto ruĝiĝis pro la ĝojo, kaj agrabla varmo plenigis ŝian koron. Jen, kiel multaj bonuloj vivas en la mondo, al ili apartenas eĉ ŝiaj amikoj!

La pasero kaŝis sian bekon sub la flugilo, kaj ĝi kuŝis kun okuloj fermitaj. Dum ĝi spiradis elĉerpita, ĝia brusteto leviĝis kaj malleviĝis apenaŭ rimarkeble.

– Ĝi vivas – konstatis Ŝaŭmreĝo.

– Ĝi vivas – ĝojis la ŝaŭmuloj kaj malpurajuloj.

Ili pli kaj pli proksimiĝis al Ŝaŭmeto kaj al la birdeto, ŝirmata per ŝiaj manoj.

– Mallevu viajn manojn, ĉar mi vidas la birdeton ne bone ! – petis la plej malgranda ŝaŭmulo.

– Ankaŭ mi vidas ĝin malbone. – plendis la plej malgranda malpuraĵulo.

Ŝaŭmeto zorgeme mallevis la manojn, tiel, ke ili preskaŭ tuŝis la akvon. Ĉiuj vivuloj de la regno tumultis ĉirkaŭ ŝi.

– Iomete retiriĝu! – petis Ŝaŭmeto. – La kompatindulo ne sufiĉe povas spiradi.

– Retiriĝu! – komandis tuj Ŝaŭmgeneralo kaj ankaŭ Nigra Generalo. Jen, ĉiu subulo ĝentile retiriĝis.

– Verdire oni devus bani ĝin – notis Ŝaŭmgeneralo. – Ĝi tuj refreŝiĝus, rekonsciiĝus!

– Ĉu bani ĝin? – konsterniĝis Nigra Generalo. – En kio vi intencus?

– Kial vi demandas sensencaĵon? – diris Ŝaŭmgeneralo kaj rondigis la okulojn. – Kompreneble en la banakvo!

– Dio ĝin gardu kontraŭ tio! – abruptis Nigra Generalo. – Ĉu via generala moŝto ne scias, ke paseroj baniĝas en polvo?

– Paseroj ja baniĝas en polvo – ripetis la malpuraĵuloj. – Estus dece, ke oni sciu tion!

Ŝaŭmaĝeneralo laŭte ekridis pro la embaraso.

– Ha-ha-ha! Ion tian mi ankoraŭ neniam aŭdis! Baniĝi en polvo! Estas bonŝanco, ke ne rekte en koto!

– Ion tian mi ankoraŭ neniam aŭdis! – ripetis la ŝaŭmuloj – Estas bonŝanco, ke ne rekte en koto!


– Aproj ja baniĝas en koto, do ili kotbaniĝas en ŝlimo! – deklaris Nigra Generalo. – Estus dece, ke oni sciu tion!

– Nepre estus dece, ke oni sciu tion! – diris la malpuraĵuloj koruse.

La vizaĝo de Ŝaŭmgeneralo ruĝigis pro la kolero. Li eltiris sian glavon, ĝian pinton levis al la ĉielo, kaj kriis:

– Ataaaku! Trapiku, distranĉu, buĉu, mortbatu, masakru, englutu ĉiun malpuraĵulon!





– Ĉu mi nepre devas? – demandis la plej malgranda ŝaŭmulo.

– Nepre! – respondis firme Ŝaŭmgeneralo.

– Ĉu eĉ la plej malgrandan malpuraĵulon?

– Senescepte! Ili ĉiuj estas danĝeraj! Ili inklinas bani kompatindan paseron en polvo, dronigi ĝin en malpuraĵo. Honesta bravulo ne povas permesi tion! Pro nia kavalira virto ni ne povas resti pasivaj! Neniigu ilin!

Tiam ankaŭ Nigra Generalo eltiris sian glavon.

– Ŝaŭmeto, savu mian popolon kontraŭ tiuj frenezuloj! Ili inklinas dronigi kompatindan paseron en ŝaŭma banakvo! Estus plej oportune, se vi forigus ilin ĉiujn tra la defluilo!

Ŝaŭmreĝo nur miris, observadis kaj svingadis la kapon.

Ŝaŭmeto milde blovetis al la kapo de pasero.

– Ĝi ekmovis sin! – ŝi ĝojkriis laŭte.


Sed neniu aŭdis tion. La ŝaŭmuloj komencis ĝeneralan atakon, la malpuraĵuloj komencis ĝeneralan fuĝadon. Ŝaŭmgeneralo senĉese blovadis sian trumpeton tiom forte, ke li mem ŝvelis duoble pli granda. La plej malgranda ŝaŭmulo frapadis tamburon tiom forte, ke liaj brakoj preskaŭ deŝiriĝis. La malpuraĵuloj fuĝante de la proksimiĝantaj ŝaŭmuloj kroĉiĝis al la flanko de la bankuvo, pro tio ĉirkaŭe aperis deprima griza strio.

Ŝaŭmreĝo plu svingadis la kapon.

– Mi dezirus scii, kiam vi reakiros vian prudenton – li notis.

Ŝaŭmgeneralo haste viŝis sian frunton.





– Ni tute ne perdis la prudenton! – li deklaris fiere. – Finfine ni purigos la bankuvon, kaj forigos tiujn frenezulojn. Tiam aperos bela, nova mondo!

Nigra Generalo sur la flanko de la bankuvo replikis:

– Ni preferas transmondon al tiaj ŝtipokapaj vantuloj!

Ŝaŭmeto denove blovetis milde al la sveninta birdeto. Pro la karesanta aero la pasero iomete hirtigis siajn plumojn, poste tiris sian bekon el sub la flugilo, kaj ĉirkaŭrigardis. Eĉ Ŝaŭmreĝo ne povus diveni, kion ĝi pensis, sed estas fakto, ke ĝi – huŝ! – ekflugis, kaj forlasis la banĉambron tra la malfermita fenestro.

– Adiaŭ, kara pasero, vivu longe, vivu feliĉe! – kriis Ŝaŭmeto tiel laŭte, ke tion jam ĉiu aŭdis bone.

Ĉia milita inklino de ŝaŭmuloj tuj forvaporigis. Ili malrapide renaĝis, kaj viciĝis antaŭ la ŝaŭmkastelo.

Ankaŭ la malpuraĵuloj forlasis la randon de la bankuvo, do la griza strio tuj malaperis. Ili ankoraŭ tremis pro la pli frua terurigo, kiam ili finfine ariĝis ĉirkaŭ Ŝaŭmeto.

Ĉiu atentis la maljunan, saĝan reĝon, ĉar li evidente intencis diri ion gravan.

Do grakante li zorge preparis la gorĝon, kaj ekparolis:

– Atentu, ŝaŭmuloj! Ĉu vi scias, kio estas pedikoj kaj vermoj?

La ŝaŭmuloj alrigardis unue Ŝaŭmgeneralon, poste unu la alian. Ili skuis la kapon.

– Ni ne scias.

– Vantuloj! – primokis ilin la malpuraĵuloj. – Ili eĉ tion ne scias!

– Temas pri malgrandaj parazitaj! – levis Ŝaŭmreĝo sian rektigitan montrofigron. – Kaj ili damaĝas la haŭton kaj plumojn de la birdoj. Eĉ tiujn de malgranda pasero. Tial paseroj baniĝas efektive en polvo kaj malpuraĵoj por iamaniere liberiĝi de ili.

– Jen, ni diris tion! – ĝojkriis la malpuraĵuloj.

– Ŝtopiĝu! Nun atentu vi, malpuraĵuloj! Ĉu vi jam vidis paseron baniĝi en flako? Ĉu vi vidis, ke ĝi malvarmigas sin en akvo?

- Ĉu ni devus vidi ion tian? – ekmiris Nigra Generalo.
- Ĉu ni devus vidi ion tian? – ekmiris ĉiu malpurajulo.
- Stultuloj! Ŝtipokapuloj! – primokis ilin la ŝaŭmuloj.
- Karakterize! – konsentis Ŝaŭmreĝo kun severa mieno.

Li dignoplene levis sian kapon, kaj lia rigardo trakuris sur la tuta popolo de sia bankuva regno.

– Por ke en la futuro ni evitu sensencajn militojn pro stultaj kvereloj, mi ordonas al vivuloj kaj mortintoj, al ĉiu subulo de ŝaŭma Mirlando, ke ekde nun oni devas vidi pli malproksimen ol ĝis la propra nazpinto!

– Ĉu ankaŭ mi? – demandis Ŝaŭmeto.

– Estas precipe vi, kiu devas! – respondis Ŝaŭmreĝo. – Ekde aŭtuno vi ja vizitados jam lernejon!

– Ŝaŭmeto! – ŝi ekaŭdis la voĉon de patrino – Ŝaŭmeto, urĝe elvenu por neniel malvarmumi!

– Tuj mi venos – kriis Ŝaŭmeto, kaj forlasis ŝaŭman Mirlandon.

Dekdua rakonto,
en kiu evidentiĝos, *kio estas lernejo*

Imagu! Ŝaŭmeto maturiĝis tiagrade, ke oni devis ŝin enskibigi en lernejo! Pro tio ŝi ekmeditis tiel profunde, ke ŝi – jen surprize – forgesis uzi eĉ banŝaŭmon. Ŝi nur sidis kaj sidadis, dum la abunda banakvo ĉirkaŭis ŝin ĝis la brusto, kaj en fantazio ŝi vidis, ke ŝi ne plu vizitados infanĝardenon, ŝi ne plu vidos la infanĝardenistinojn onjo Agnesa kaj onjo Magdalena. Eĉ tio povas okazi, ke ŝi neniam

plu vidos la knabon Steĉjo Tajlor, kaj pro tio ŝi ekhavis iomete melankolian humoron, tamen ne tre melankolian, ĉar nur maturaj infanoj rajtas vizitadi lernejon anstataŭ infanĝardeno, do la situacio pruvas, ke ankaŭ ŝi maturiĝis intertempe. – Ĉu vi scias – flustris Ŝaŭmeto – ke mi maturiĝis?

Sed neniu respondis.

La malpuraĵuloj ripozeme nenifaris.

Unu sur la genuo de Ŝaŭmeto, alia sur ŝia kolo, ceteraj sur ŝiaj oreloj, fingroj aŭ buŝanguloj. La ŝaŭmuloj, kvazaŭ en longforma, verda, plasta flakono atendis sian renaskiĝon.

Ŝaŭmeto levis ĝin de sur la rando de la bankuvo, singarde renversis ĝin, kaj observis, kiel serpentumas el ĝi la bonodora densaĵo, kiel la

banŝaŭmo elverŝiĝas kaj disiĝas en la akvo.

Sed observis ne sole ŝi.

– Tiom sufiĉas jam! – admonis Nigra Generalo. Li sidis sur la plej oportuna gvatloko, kie li povis vidi la situacion perfekte, do sur la nazpinto de Ŝaŭmeto. – Nenion vi faru ĝis troa grado!

– Laŭ via ordono, sinjoro generalo! – ridetis Ŝaŭmeto, kaj ŝtopis la flakonon. Ŝi kirlis kaj frapadis la akvon, ĝis ĉiuj ŝaŭmuloj aperis, kaj la turo de la ŝaŭmkastelo de Ŝaŭmreĝo leviĝis. Ŝaŭmeto levis la brakon, kvazaŭ ĝi estus fervoja bariero, poste mallevis ĝin. Ĉe alia loko ŝi denove levis la brakon, kaj denove mallevis ĝin. Tiel ŝi eltranĉis kompletan ĉirkaŭfosaĵon, elfosis kavon en la interno de la kastelo, iomete alĝustigis ilin, kaj jen, denove ĉio kaj ĉiu estis preta.

– Ĉu vi aŭdis? – flustris Ŝaŭmeto. – Mi maturiĝis, do mi vizitados lernejon!

– Ho, bonege! – ĝojkriis la plej malgranda ŝaŭmulo. Kvankam poste li aldonis pli malgaje: – Mi pensas, ke mi rajtos vizitadi lernejon nur post longa tempo.

– Ankaŭ mi pensas tion – diris ankaŭ la plej malgranda malpurajulo, kaj ankaŭ li fariĝis iom malgaja.


– Ba! Mansvingis Ŝaŭmgeneralo kaj Nigra generalo preskaŭ samtempe. – Vi ja eĉ ne scias, kia estas lernejo!

– Kial? Kia estas lernejo? – levis la kapon Ŝaŭmeto. – Ĉu vi efektive scias tion?

– Ĉu mi? Kiel mi povus ne scii? – fanfaronis ambaŭ generaloj, kaj ili frapadis sian bruston fiere.

Kaj Ŝaŭmgeneralo tuj komencis elnombri:

– Ĉiutage vi devas akurate alveni al la lernejo; sen helpo vi devas demeti la porstratajn vestojn, sen helpo vi devas enŝrankigi ilin; ĉe la unua sonoro vi jam devas sidi sur via benko aŭ sur via seĝo, kaj silente vi devas atendadi, ĝis ekparolos la instruisto aŭ instruistino. En la studhoru vi devas atendadi, vi ne rajtas interrompi la paroladon de aliaj, sed vi devas noti kaj plenumi la ordonojn de la instruisto aŭ instruistino. Vi eĉ ne rajtas ludi, antaŭ ol vi faris viajn taskojn. Jen, tia



estas lernejo! Vi fariĝos bonedukita, saĝa, ordema knabineto, vi ja vidos, kaj ni ŝaŭmuloj estos fieraj pri vi senescepte!

Kaj Ŝaŭmgeneralo montris tiel fieran mienon, kvazaŭ Ŝaŭmeto jam estus fininta siajn lerneajn jarojn.

Sed Ŝaŭmeto montris tiel acidan humoron, ke Nigra Generalo devis ŝin konsoli:

– Eĉ unu lian vorton ne kredu! Lernejo estas interesa aventuro. En la studhoro oni povas plej agrable babiladi mallaŭte, apliki kaŝhelpilon sub la tableto, kaŝe manĝi. Dum la paŭzoj vi povas kuradi en la korto, ridadi, kvereli, vi povas akiri bonajn amikojn aŭ persistajn malamikojn kiel al vi plaĉas. Vi ja devas ankaŭ lerni, sed pro kelkaj malbonaj notoj ne venos la fino de la mondo.

– Do kia estas lernejo efektive? Ĉu tia aŭ ĉi tia? – demandis Ŝaŭmeto, kaj konfuzita ŝi rigardis al Ŝaŭmreĝo.

Ŝia amata patro dum kelka tempo hezitis, poste firme deklaris:

– Mi ne scias.

– Kiu do scias entute, se eĉ vi ne scias? – demandis Ŝaŭmeto malbonhumore.

– Ni provu! – proponis tiam la maljuna saĝa reĝo, kaj montris unue al la dekstra poste al la maldekstra parto de la placo antaŭ la ŝaŭmkastelo. – Ŝaŭmgeneralo, vi aranĝos lernejon tie, kaj Nigra Generalo, vi ĉi tie. Poste ni vidos, kio okazos.

Ŝaŭmgeneralo tuj ordonis:

– Ŝaŭmuloj! Enviciĝu laŭ alteco, aranĝu vin en kolonon de kvaropoj kaj sidiĝu! Malpaku legolibron, skribkajeron, krajonon! Ne malŝparu tempon, ne bruadu, min atentu!

Kaj okazis tiel. La ŝaŭmuloj sidiĝis en ordo po kvar, antaŭe la altaj, malantaŭe la malaltaj. Ili laŭregule malpakis la lernilojn, ili ne malŝparis la tempon, ne bruadis, sed fikse rigardis Ŝaŭmgeneralon.

– Al kiu mi montros, tiu legu la tekston laŭte, la aliaj legu mute – kaj per la glavopinto li montris al iu altstatura ŝaŭmulo. – Komencu!

– "Ŝaŭ-me-to. U-nu-a ra-kon-to, en ki-u mal-kov-ri-ĝos, ki-al Ŝaŭ-me-to no-mi-ĝas Ŝaŭ-me-to."

– Ĝuste! – kapjesis Ŝaŭmgeneralo, kaj li montris al mutleganto apud la altstatura ŝaŭmulo. Tiu tuj daŭrigis:

– "I-ma-gu! Ŝaŭ-me-to es-tas be-la kvin-ja-ra kna-bi-ne-to..."

La fantazio de plej malgranda ŝaŭmulo vagadis malproksime. Li ĝuste volis alparoli belegan ŝaŭmknabinon, kiam severa voĉo frapis lin:

– Ĉu vi nek vidas, nek aŭdas, knabeto?! – svingadis la glavon Ŝaŭmgeneralo. – Venas via vico!

Pro tio la plej malgranda ŝaŭmulo ektimis tiagrade, ke eĉ unusola voĉo ne trovis elirejon ĉe lia gorĝo.

Ŝaŭmeto ekkompatis lin tiel, ke ŝi sidigis lin sur sia manplato, kaj translokigis lin al la lernejo de malpuraĵuloj. Ĉar intertempe ankaŭ tie komenciĝis la instruado, kvankam tio ne estis facile rimarkebla.

Nigra Generalo staris en la rondo de malpuraĵuloj, kaj kriadis plengorĝe:

– Nu, kiu volas legi? Kiu volas legi?

Sed la malpuraĵuloj tute ignoris lin. Ili ludadis per ringoj el malpuraĵo, kaj ili bonhumore ridadis. La plej malgranda ŝaŭmulo levis la manon por anonci sin. Nigra Generalo sentis, kvazaŭ lia brusto liberiĝus de peza ŝtonego.

– Aŭskultu! Aŭskultu! – li kriis. – La legadon komencos la plej malgranda ŝaŭmulo. Estus dece, se oni silente aŭskultus la gaston!

Tuj fariĝis silento tia, ke oni povus aŭdi eĉ la zumbadon de kulo, aŭ la pepadon de pasero, se tiaspeculoj



entute vagadus en la proksimo. Poste la vortoj kaj frazoj de la plej malgranda ŝaŭmulo fluis tiel bele, ke ĉe la fino de la rakonto la plej malgranda malpuraĵulo kliniĝis pli proksimen, kaj flustris al lia orelo:

– Ĉu ni fariĝu amikoj?

– Ni fariĝu! – respondis tuj lia nova amiko tiel entuziasme, ke eĉ lia koro komencis pli forte bati.

– Nu – demandis Ŝaŭmreĝo al sia unusola filino. – Kiun lernejon vi preferus vizitadi, Ŝaŭmeto? Ĉu tiun, aŭ ĉi tiun?

– Ĉu mi ne povus vizitadi samtempe ilin ambaŭ? – ekmeditis Ŝaŭmeto.

– Sciu, ke vi prezentis tre saĝan demandon! – kapjesis Ŝaŭmreĝo, kaj ankoraŭ longe kapjesadis. – Se en la vera mondo tamen vi ne trovus tian eblon – li aldonis –, iam ajn vi povas min viziti en ŝaŭma Mirlando.

FINO

ENHAVO

UNUA RAKONTO, en kiu malkovriĝos,
kial Ŝaŭmeto nomiĝas Ŝaŭmeto

3



DUA RAKONTO, en kiu oni
povas ekvidi ŝaŭman Mirlandon

8



TRIA RAKONTO, en kiu
la domaraneo fine eskapos

13



KVARA RAKONTO, en kiu
Ŝaŭmeto fine konsoliĝas
17



KVINA RAKONTO, en kiu oni povas
informiĝi pri la televidmalsano de Ŝaŭmeto
21



SESA RAKONTO,
en kiu aperas kulo
27



SEPA RAKONTO, en kiu
gasterosteo preskaŭ dronas
32



OKA RAKONTO, en kiu oni trovas nekutimajn
makulojn sur la haŭto de Ŝaŭmeto
37



NAUXA RAKONTO, en kiu la plej
malgrandaj ĉeestantoj interamikiĝas
42



DEKA RAKONTO, en kiu
alvenas novaj rolantoj
47



DEKUNUA RAKONTO, en kiu envenas
misvojiĝinta pasero, kaj eksplodas milito
53



DEKDUA RAKONTOM, en kiu
evidentiĝos, kio estas lernejo
59



©VARGA Domokos György


©PERJÉS Bernadett

©VIZI László

Budapeŝto 2016

ISBN 978-963-12-5940-7

FILMETOJ KAJ MUZIKO PRI ŜAŬMETO
en la hungara lingvo kaj *en esperanto*



Habocska – az ötéves óvodáskislány
Ŝaŭmeto, la kvinjara knabineto



Habocska – Mesehabországban.
Habkirály, koszfilkók és habfilkók
Ŝaŭmeto en ŝaŭma Mirlando




Habocska – és a házipók
Ŝaŭmeto kaj la domaraneo




Habocska – és a betévedt veréb

Šauņa Mirlando







La plej mirinda eblo de ŝaŭma Mirlando estas tio, ke vi mem povas ĝin konstrui kaj plibeligi. Ŝaŭmeto levis la brakon, kvazaŭ ĝi estus fervoja bariero, poste mallevis ĝin. Ĉe alia loko ŝi denove levis la brakon, kaj denove mallevis ĝin. Tiel ŝi eltrancis kompletan ĉirkaŭfosajon, kaj jen, tuĵ antaŭ ŝiaj okuloj flosis la neĝblanka ŝaŭmkastelo de Ŝaŭmreĝo. Turon ĝi ankoraŭ ne havis, sed tiu manko estis facile riparebla: Ŝaŭmeto formis pintan konuson el ŝaŭmo, kaj metis ĝin al la konvena loko. Ŝi atentis eĉ pri tio, ke ŝi elfosu kavon en la interno de la kastelo, por ke Ŝaŭmreĝo kaj liaj subuloj havu liberan spacon por tie loĝi.